

“-Sinjorinoj kaj sinjoroj, ni parolas en Esperanto. Kio ĝi estas? Ĉu ĝi estas politiko? Ne! Ĉu ĝi estas religio? Ne! Ĝi estas kulturo. Ĉu vi komprenas?”

Julio BAGHY: La verda koro

BAZARO

**Esperantlingva revuo
Cluj-Napoca, Jaro I, Numero 1
1997, Printempo**

RO-ISSN

ABONO !

Kiu deziras pluen ricevi la gazeton BAZARO, bonvolu perpoŝte sendi 2x1500=3000 leojn al jena adreso:

ASOCIO de ESPERANTO CLUJ, C.P.1111. RO-3400 CLUJ-NAPOCA
Tiu estas la egalvaloro de du numeroj (la nuna kaj la sekvonta). Por la numero 3, pro la kuranta inflacio ankoraŭ ni ne povas konigi al vi la prezon, sed ni aperigos ĝin en la sekvonta numero de BAZARO.

Ni akceptos donacojn, subtenojn kaj varbas distribuantojn por nia gazeto!

Dankon, La red.

ALVOKO !

BAZARO intencas aperi la liston de Rumaniaj geesperantistoj. Personoj enlistigotaj havos nenium devon, ekzemple gastigi aliajn esperantistojn, loĝigi aŭ helpi ilin. Tiu listo servos nur kiel adresaro kaj dokumento pri la nombro kaj loĝloko de geesperantistoj en Rumanio.

Tiusence mi petas vin fotokopii la jenan formularon, disdonu ĝin inter la geesperantistoj de via klubo aŭ urbo kaj plenigite resendu al ni. Vi povas nur simple skribi sur blanka papero la datumojn petatajn de la formularo kaj sendi ĝin al la redakcio.

Familia nomo:

Persona nomo:

Naskiĝdato:

Sekso: viravrina

Adreso:

Urbo/vilaĝo:

Poŝtkodo:

Telefono:

Profesio:

Laŭdezire vi povas malplenigi unu aŭ pli da rubrikoj, pri kiu vi opinias, ke ĝi restu "via sekreto".

Redakcio:

ASOCIO de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 CLUJ-NAPOCA C.P.1111,
RUMANIO

Eldonas:

Eldonejo DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,
RUMANIO kaj
MUNICIPALA KULTURDOMO,
P-ta Unirii nr-o 24
RO-3400, Cluj-Napoca, RUMANIO

Redakcia komitato:

Radu CRETU, SIGMOND Julia,
KOLOZSVARI Zsolt

Redactia:

ASOCIATIA de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 CLUJ NAPOCA C.P.1111,
RUMANIO

Editat de:

Editura DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca
RUMANIO si
CASA MUNICIPALA DE CULTURA
P-ta Unirii nr. 24
RO-3400, Cluj-Napoca, ROMANIA

Comisia de redactie:

Radu CRETU, SIGMOND Julia,
KOLOZSVARI Zsolt

Dank' al L.L. Zamenhof

Kiel la sunbrilo varmigas la terglobon,
tiel ankaŭ Esperanto varmigas nian koron.
Kiel Zamenhof nia granda instruisto revadis,
la internacian lingvon li ne senrezulte inventis.

Li sukcesis krei per ĝi amon inter homoj,
senescepte inter lingvoj kaj nacioj.
Estu iu mirakla ankaŭ la afero,
ke Esperanto disvastigis jam sur tuta tero.

Kiom proksimen oni povas alporti la malproksimon,
kiam la homoj parolas la saman lingvon.
Ni devas danki al Zamenhof tion,
ke li beligis per Esperanto ankaŭ nian vivon.

NAGY Irina, ORADEA

Poemo de komencanto

Mi estas nur komencanto,
en la lingvo Esperanto.
Tro multe mi ne komprenas,
nur malmulte legas, skribas.
Sed nia instruistino,

estas bona sinjorino.
Ŝi instruas nin pacience,
kaj ni lernas diligente.
Ni dankas ŝian klopodon,
dezirante al ŝi feliĉan vivon.

NAGY David, ORADEA

La bovinoj en la politiko

Socialismo: Se vi havas du bovinojn, donu unu al via najbaro.

Komunismo: Se vi havas du bovinojn, donu ilin al la registaro; tiam la registaro donos al vi iom da lakto.

Faŝismo: Se vi havas du bovinojn, tenu ilin kaj donu al la registaro; tiam la registaro vendos al vi iom da lakto.

Nacisocialismo: Se vi havas du bovinojn, la registaro mortpafos vin kaj prenos la bovinojn.

Kapitalismo: Se vi havas du bovinojn, vendu un kaj aĉetu virbovon.

el LA FROMAĜKLOŜO

Iom pri la kalendaro

La nuna kalendaro estis farita de Sosigeno kaj Julio Cezaro dekretis ĝin en la jaro 45 a.n.e. (antaŭ nia erao)

Sed, ĉar fakte la reala kalendaro estas kun proksime 11 minutojn pli mallonga ol Julia Kalendaro (365 tagojn kaj 6 horojn), en la jaro 1582 oni faris korekton subtrahante 10 tagojn, do post 4 oktobro sekvis 15 oktobro kaj oni decidis, ke en daŭrperiodo de 400 jaroj oni subtrahas 3 tagojn kaj la jarcentoj, kiujn oni dividas kun 4 restas nur 2000 kiel superjaro.

Do, en la daŭrperiodo de 400 jaroj de 1601-2000 la jaroj 1700, 1800 1900, kiuj estus devintaj esti superjaroj restas ordinaraĵ, tiel subtrahante 3 tagojn.

En Rumanio ĉi tiu kalendaro estis enkondukita en la jaro 1924 la 14-an de oktobro, sed oni subtrahis 13 tagojn, ĉar oni aldonis 3 tagojn por la jarcento 1700, 1800, 1900. Do post la 14-an de oktobro sekvis la 28-an de oktobro. Oni povas diri, ke la jaro 1924 estis la plej mallonga jaro por la rumanoj.

DODO, CLUJ-NAPOCA

Printempaj travivaĵoj 1997

“Primavero, primavero... La ridet’ de l’estajar’ “ - diris rumana poeto Octavian Goga, kiun esperantigis Ionel ONET. Vere, ĉi printempo alportis al ni novajn travivaĵojn, novajn geesperantistojn al E-Klubo Turda. Ili partoprenis la konkurson pri modela parolo de Esperanto, honore al Ivo Lapenna. Organizanto de ĉi konkurso estis prof. Ivan BEKAVAC-BASIC el Zagrebo - Kroatio. La studado de IL-on okazas per lernolibro de prof. Mihai TRIFOI el Bicsad - Rumanio, kun kies gelnantoj ni korespondas esperante. Ankaŭ miaj turdanaj gelnantoj korespondas esperante kun gelnantoj de tutmonda famkonata Monique NOEL el Outreau - Francio. Si multe prizorgas E-agadon de turdanoj kaj helpas ĝin, do nin ĉiujn.

Per Esperanto ni kune altigas la odon al la ĝojo, al la printempo, al la renaskiĝo de la naturo, de la vivo en ĉiuj lokoj kaj anguloj de la tuta estajaro.

EUGENIA, TURDA

La TEJO/SEL Seminario en Lublino - Pollando

La seminario okazis de la 26.10.1996. ĝis 02.11.1996., kaj la temo estis “Junularo sen limoj - agado por internacia interkompreniĝo”. TEJO organizas regule unu aŭ dufoje jare TEJO/KER seminariojn, kaj el Timisoara kune kun du esperantistoj ni sukcesis partopreni la seminarion en Lublino.

La celo de la aranĝo estis la interkonatiĝo inter diversaj nacioj, prezento de la aktivado de TEJO kaj SEL kaj renkontiĝo kun reprezentantoj de Pola Skolta Asocio.

La programo konsistis el diversaj prelegoj, diskutoj, ekskursoj kaj distraĵoj. La prelegoj temis pri temoj kiel la valoroj de pluraleca socio kaj multkulturismo en Kanado, AERA, Interreto, la historio kaj strukturo de TEJO kaj Skoltaj Esperanto-Ligo, ktp...

Kadre de la seminario oni organizis specialan ekspozicion, t.e. ĉiu nacio antaŭe preparis afiŝon pri sia lando kaj unu el la vesperoj estis dediĉita al gustumado de tipaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj el la regiono, de kie venis la partoprenantoj.

Dum la seminario okazis ankaŭ ekskurso al la eksa nazia koncentrejo MAJDANEK, kaj al la Lublina tombejo, okaze de la festo de Ĉiuj Sanktuloj. Ni povis ankaŭ interretumi en la bonege ekipita komputila ĉambro de la seminariejo, kie ni ricevis salutmesaĝojn rete de pli ol 30 landoj.

Eĉ se en Lublino la plej grava problemo de la organizantoj estis manko de aliĝoj, laŭ mia opinio en la malgranda grupo eblis konatiĝi kun ĉiu kaj la etoso dum la seminario estis brila.

Iuliana TRIFAN, SIBIU

Kion mi dankas al Esperanto?

Estis decembro. Miaj okuloj estis plenaj da larmoj. Mia edzo agoniis, kaj mi petis lin, ne forlasu min, “ĉar vi bone scias, mi ne povus vivi sola”. Sed lia personeco restis nur senvoĉaj, silentaj literoj sur la malvarma ŝtonplato.

Antaŭ mi nur ĉagreno, malĝojo, soleco kaj la granda demando: kion fari pluen? Kiel vivi pluen?

Ne volante frenezigi, mi decidis eklerni iun fremdan lingvon. Tiam mi komencis lerni Esperanton. La ĉiusemajnaj kursoj donis al mi novan vivmanieron. Mi rimarkis, ke mi komencis farti bone inter la geesperantistoj. Diversaj vizaĝoj, ridetoj kaj rakontoj liberigis min de mia malĝoja stato. Iom post iom mi sentis la ĝojon, ke mi ne estis sola. Posedante jam pli bone la lingvon, mi komencis partopreni la diversajn landajn renkontiĝojn en Satu-Mare, Cluj, Alba-Iulia, Timisoara, Sibiu, Oradea. Mi konvinkiĝis, ke Esperanto estas ne nur movado, sed ankaŭ feliĉo, ke ni estas granda familio. Ĉi tiu sento tuŝis min tiam, kiam mi partoprenis la diversajn eksterlandajn kongresojn. Tie parolante la saman lingvon mi bone povis kompreni unu la alian, malgraŭ tio, ke ĉiu alvenis el diversaj landoj. Tiamaniere mi dankas al Esperanto ne nur multajn karajn korespondgeamikojn, sed ankaŭ alian vivsenton, kiu ne estas sama kun ĉiutaga vivpenado.

Esperanto signifas ankaŭ multe da amo. Mia vivo estas vera tiam,

kiam mi vivas por aliuloj. Nun estas printempo. La naturo estas verda, kiel la Esperanta stelo kaj plena da multkoloraj floroj. La suno brilas kaj nia koro estas plena da espero, ke en la mondo kreskos la ĝojo, feliĉo kaj komprenemo, ke ni povu pli bone ekkoni kaj ami unu la alian, parolante la saman lingvon.

Granda Dio, donu, ke fariĝu multaj homoj ESPERANTISTO!

LASZLO Maria, BAIJA MARE

La plej konsiderinda vidindaĵo de nia urbo

Kvankam en 1241 la tataroj detruis grandparte la fortikajon, la sidejon de reĝa departemento Klws (pronocu kluj), kaj kiel la tiama kronikverkisto menciis, "en la fortikajo, la kiu oni diras Clusa (pron. Kluĵa), ili (la tataroj) buĉadis senfinan amason da hungaroj), dank' al sia favora geografia situacio, ĝi denove komencis kreskadi. Tiel, ke en 1316 Karlo Roberto, reĝo de Hungarujo, konkeris al la vilaĝo Culuswar (pron. kulujvar, var = fortikajo) urban titolon kun urbaj rajtoj. Tio estis tiel grava evento en la vivo de la tiama malgranda loĝatejo, ke ekster la muroj sur la tiama foirplaco - nun ĉefplaco - oni baldaŭ komencis konstrui grandan, gotikstilan paroĥpreĝejon, kies patrono estis kaj estas ankaŭ hodiaŭ Sankta Miĥaelo. Unue oni konstruis la sanktejon. Tio en 1349, kiam urba delegacio vizitis la papon en Avignon, supozeble jam estis preta. Tielmaniere la triparta navo, kion oni finis en la komenco de la XV-a jarcento, dum la regado de Luksemburga Sigismundo, estis multe pli granda, kiel devus esti, kompare kun la sanktejo. Dum la reformacio, kiam la kredantoj estiĝis unue evangeliaj, poste reformacianoj, fine de 1568, kiam la tuta urbo konvertiĝis al la unitaria kredo, la preĝejo estiĝis evangelia, reformaciana, poste unitaria ĝis 1716. Tiam post la falo de la kontraŭhabsburga liberiga milito, la habsburga armeo okupis la urbon, kaj ĝi estiĝis denove romkatolika. La 80 metrojn altan turon oni konstruis inter 1837 kaj 1859.

ASZTALOS Lajos, CLUJ-NAPOCA

OPINIOJ, KONSILIOJ, KRITIKOJ, PROPONOJ

Preskaŭ 100 ekzempleroj el la provnumero de BAZARO estis dissenditaj al geesperantistoj, bibliotekoj, redakcioj de gazetoj kaj revuoj en Austrio, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉinio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kanado, Kroatio, Nederlando, Pollando, Slovakio, Usono kaj en 19 urboj de Rumanio (Baia Mare, Bicsad, Brasov, Bucuresti, Cluj-Napoca, Constanta, Covasna, Gheorgheni, Miercurea Ciuc, Nadlac, Oradea, Praid, Satu-Mare, Sibiu, Slatina, Suceava, Timisoara, Tomesti, Turda).

El iliaj reagoj ni konkludas, ke BAZARO estas legata kaj bezonata!

Tio ĝojigas kaj igas nin fari el ĝi veran Esperantan revuon, kiu kontentigu la plimulton el la deziroj de nia legantaro. Ni deziras esti samtempe informilo de Rumania Esperanto-movado por eksterlando, informi la Rumanian esperantistaron pri la eventoj de la en- kaj eksterlandaj Esperantaj agadoj, respektive esti instruilo por la Rumaniaj geesperantistoj. Por plenumi tion, ni bezonas ankaŭ vian helpon!

Jen la reagoj pri la provnumero de BAZARO el la ĝis nun alvenintaj leteroj de la legantoj:

Mi volas proponi por sekvontaj numeroj rubrikon kun Esperanto literaturo.

Mihai-Aurelian BOGDAN, TURDA

Mi ricevis bonorde la nulan numeron de BAZARO, al kiu mi deziras longan, sukcesplenan vivon.

Ionel ONET, BERKELEY, USONO

Kiel vi imagas la enhavon de BAZARO? Kaj ĉu la Eldonejo Dokia intencas aperigi E-lingvan libron?

Estus neceso de informoj pri la E-movado el diversaj partoj de nia lando.

Estus interesa ekscii pri la diversaj eventoj (kongresoj aŭ renkontiĝoj), kiu okazos en nia lando.

BAZARO estu ankaŭ amuziga gazeto, iomete simila al JUNA AMIKO. Devus enhavi diversajn enigmojn, serĉojn, anoncetojn, korespondpetojn.

Eble ankaŭ mi povos kontribui... mi povus skribi pri interesaj kutimoj de diversaj popoloj, pri astrologio, aŭ fari E-lingvajn enigmojn ktp.

SIMON Laszlo, ORADEA

Mi povas sendi al vi kelkajn memverkitajn E-poemojn, desegnaĵojn, krucvortenigmojn, artikolojn pri la aktiveco de nia E-grupo, pri interesaj eventoj.

NAGY Irina, ORADEA

La pensoj, ideoj esprimitaj en la artikoloj kolektiĝos en BAZARO, kiun vi disponigos al ĉiuj, aŭ almenaŭ al plej multaj. Ĝi fariĝos ponto inter samideanoj de nia lando.

Plezure ni atendas legi la printempan numeron de BAZARO, ĝi havos honoran lokon en nia Asocio, ĉar ĝi estos nia rumana Esperantgazeto.

SZUCS Irene, ORADEA

Miaj proponoj:

Daŭrigi la publikigon de leteroj skribitaj de esperantistoj.

Kolekti kaj publikigi diversajn materialojn de E-literaturo kaj tradukadoj. Anekdotojn, artikolojn pri ekonomiaj problemoj.

Publikigi la adresojn de geesperantistoj, kiuj deziras korespondi.

Publikigi eventojn pri nacia kaj internacia E-aranĝoj (kunvenoj kaj kongresoj).

MONOSI Lorand, ORADEA

En senpaga provnumero de BAZARO trideko de geesperantistoj el Rumanio rakontas pri siaj E-travivaĵoj en la jaro 1996, kongresaj, vojaĝaj kaj aliaj: interesa kalejdoskopo, kiu atestas pri la grava loko okupata de Esperanto en la individua vivo de multaj.

revuo ESPERANTO

Estus laŭdinde, se aperus la printempa numero de BAZARO.

Krom la E-travivaĵoj la temo povus esti raportoj de diversaj E-grupoj de nia lando.

Estus bone se aperus la MANIFESTO DE PRAGO.

Estus bone renovigi niajn gramatikajn erudiciojn (ekz. Tabelvortoj, vortordo, interpunkcio, vortfarado ktp.).

Dr.FAZAKAS Alekso, ORADEA

La nomo de la revuo BAZARO estas trafa.

Pri la enhavo de la venontaj numeroj mi kredas, ke estus bone, ke ĝi konsistu el diversaj temoj, kiel: E-novaĵoj en la mondo, raportoj kun fotoj, proverboj, spritaĵoj, noveloj, fabeloj.

MIHOK-GECZI Viktoria, ORADEA

Mi sugestias ke el BAZARO ne manku la rubriko por junularo. Mi petas la veteranojn, donu helpon al la respektiva rubriko tiel, ke ĉiuj junaj legantoj atendu BAZARON, kiel la varman panon.

FARKAS Antal, ORADEA

Mi ricevis la nr-on 0 de la revuo BAZARO kaj mi deziras speciale gratuli al vi.

Iuliana TRIFAN, SIBIU

Mi gratulas vin pro sukcesa realigo de nia E-sciigilo. Dio donu al vi persiston en ĉi-tiu belega laboro. BAZARO ne havu saman sorton, kiel la aliaj ekdonadoj, sed estu tia arbido kies radikoj elkroĉiĝu en nia tuta lando.

SOFINETI Eva, BAIA-MARE

Dank'al Dio, troviĝis do la ebleco, ke finfine la vojoj de la rumanaj esperantistoj renkontiĝu, almenaŭ tiamaniere. Tamen, mi esperas ke la reala, vera renkontiĝo efektiviĝos post nelonge, kondiĉe ke en itinero de BAZARO ne manku Bucuresti, Suceava, Constanta, Craiova, Sibiu.

Valeria MANEA, ORADEA

Koran dankon pro la 0-a numero de via BAZARO. Tuj mi tralegis ĝin post la ricevo kaj pruntis al lokaj gesamideanoj. Estas laŭdinda ke vi klopodas esti E-revuon en nia lando. Ĝia enhavo estas tre varia, oni vidas panoramon de la vivanta E-movado en Transilvanio.

Ĉu estas ebleco "vestigi" iom la BAZARON, farigi ĝin pli alloga ekstere? Ĉu vi povus aperigi korespondanoncetojn?

SZASZ Lenke, PRAID

Mi ricevis vian revuon kaj mi trovis ĝin tre interesa. Mi pensas, ke ĝi oferas eblecon al ni de interkonatigo kun aliaj esperantistoj el diversaj partoj de la lando kaj scii pri oldaj problemoj, travivaĵoj. Mi esperas, ke BAZARO aperos en ĉiu monato en la tuta lando.

ing. Constantin TIBA, ORADEA

Kun ĝojo mi salutas vian provnumeron kaj gratulas al vi! Por ni, rumanaj geesperantistoj, nepre estas absolute necesa E-lingva sciigilo. La plej interesaj prelegoj estu publikataj.

LASZLO Maria, BAIA-MARE

Ni gratulas la kompilintinon kaj esperas ke la reagoj de niaj rumanaj amikoj estos abundaj kaj ke ne estas problemoj pleni la sekvan numeron de BAZARO.

Hans ten HAAGEN,
redaktisto de LA FROMAĜKLOSO,
bulteno de Esperanto Nederland, sekcio Alkmaar

Mi kaj la Brasovanoj subtenos vin, konsiderante ke estas necesega la ekzisto de iu presorgano kiu luktas por la unuiĝo de la rumana esperantistaro, kiu nun troviĝas en granda suferado, en vera skismeco, ie kaj ie eĉ konstatas la malamikecon okazigitan de la nesincereco kaj egoismo, kaj multaj aliaj kaŭzoj.

Nia propono estas ke ni organizu plej urĝe renkontiĝon de delegitoj el diversaj centroj, por analizi la situacion kaj trovi la rimedojn por forigi la malkomprenojn.

Konvinkita ke la Klujanoj havas necesajn fortojn por ellabori la regulojn por starti la presadon de la projektita BULTENO. Ni subtenos finance.

Ion SIRBU, BRASOV

Koran dankon pro la provnumero de BAZARO alsendita de vi. Mi vere ekĝojis pro ĝi, dirante por mi "Jen io Esperanta fine el Rumanio!"

Gratulon pro via kuraĝo eldoni panoramon (ĉu ne estus pli trafe bapti vian periodaĵon "Rumana Panoramo", aŭ "Esperanto-Panoramo de Rumanio"?) de la E-movado en Rumanio.

Miaj konsiloj:

-nepre redaktu la periodaĵon (enmeti ĉiujn/ĉiajn alsenditajn materialojn ne donas sufiĉe altan nivelon!)

-de tempo al tempo aperigu "pli seriozajn temojn" primovadajn, prieveventajn, prirumaniajn,

-kuraĝe korektu la alsenditajn skribaĵojn gramatike (ĉiu redaktanto rajtas fari tion!), eĉ mallongigu ĉiujn opiniojn, se tio estas jam konata de la legantoj, se iu jam raportis pri ĝia temo.

-nepre prizorgu la gramatikan ĝustecon (ekz. en via artikolo: "ciceronis" anstataŭ "ĉiceronis"), kaj multaj aliaj en aliaj raportoĵoj,

-tre grave: la sinsekvon de hungaraj nomoj uzu konsekvence: unue la persona nomo poste la familia nomo.

-plenskribu ĉiujn lokojn en la periodaĵo, la papero kaj la sendkostoj estas altkostaj.

Sed tute ne pensu, ke mi elverŝis mian koleron kontraŭ via periodaĵo.

Mi vere ĝojas pro ĝi, mi pretas interŝange sendi por ĝi mian Debrecenan Bultenon.

Ne malĝoju, sed diligente laboru!

Mi kore salutas ĉiujn, kiuj kontribuis al via BAZARO (ne bona titolo!).

PAPP Tibor, DEBRECEN, HUNGARIO

Kun plezuro mi volas helpi vian revuon, sed en kiu maniero? Ekzemple, mi povas skribi al vi pri IFEF kaj UEA Kongresoj.

Adina MOISE, CONSTANTA

Responde je viaj reagoj, unue ni devas esprimi nian dankemon pro via intereso montrita fronte al BAZARO. Viaj reagoj estis ne nur bonaj konsiloj por ni, sed ankaŭ donas al ni senton, ke nia laboro ne estas hazarda. DANKEGON!

La provnumero de nia revuo estis tajpita per skribmaŝino, kiu malhavis Esperantajn karakterojn. Tial ne estis ebla pli bone uzi la spacon kaj doni al ĝi pli allogan aspekton, kaj tiel okazis, ke evitis nian atenton la ĉapeloj de sur vorto ĉiceroni, la sola misskribo, kiun poste observis ankaŭ s-ro Papp. Ni petas vian pardonon!

Kiel vi vidas la nuna numero prezentiĝas multe pli bele kaj eble pli interese. Dank' al Municipa Kulturdomo ni redaktis ĝin per komputilo (la sola

manko estis, ke ĝi ne rekonis la E-karakterojn, kaj tio igis nin al posta korektado). En ĉi tiu numero vi jam trovos beletron, poeziojn, humuraĵojn, informojn pri E-aranĝoj, novaĵoj el Esperantujo. Same, ni jam konsekvence kun majuskloj skribas la familiajn nomojn, ke neniu havu dubojn.

Kun plezuro ni aperigus en BAZARO krucvortenigmajn, artikolojn pri diversaj kutimoj, lokoj, pri aranĝoj en via E-klubo, pro tio via kunlaboro estas bonvena. Kunlaborante kun ni BAZARO fariĝos revuo de ni ĉiuj, interligilo de Rumania Esperanto-movado. Cetero ni senpage aperigos anoncojn (ekz. se vi deziras vendi au aĉeti esperantaĵojn ktp.), kaj ni intencas estigi rubrikon de korespondemuloj, kaj adresaron de Rumaniaj geesperantistoj. Tiusence vi legu nian alvokon en la nuna revuo.

Koncerne la titolon de nia revuo troviĝas legantoj, ke ĝi ne estas trafa titolo, aliaj male, konsentos ĝin. Ni elektis ĉi-tiun titolon konsiderante unuflanke, ke ĝi respegulu la buntan enhavon kaj variecon de la revuo kaj aliflanke ni ne uzu la nomon de lando, urbo au regiono, ĉar ni volas, ke nia revuo estu vera internaciisma verkaĵo, kiel Esperanto, kiu ne estas regiona, sed universala lingvo.

La red.

ERARO

Antaŭ kelkaj tagoj mi disiĝis grandan kaj bonan parencon, sed preskaŭ ĉio en sia vivo estis malfacila komprenebla.

En la lastaj jaroj ni estis (mi kaj li), kiel du malamikoj kaj li mortis subite. Bedaŭrinde - kaj tiu estas la konfuzo kaj mia sopiro - mi ne povis paciĝi kun li ĉar li mortis rapide. Pro tio mi rekonas mian kulpon, ĉar mi kaŭzis al li kelkajn ĉagrenojn. La plej grava malkompreno konsistis el la manko de la serioza konversacio inter ni. Sed li estis preskaŭ en ĉiuj okazoj moka persono kaj ne traktis multajn problemojn serioze. Kun ĉiuj, kiuj legas ĉi tiun kaj interesas pri tiu aspekto, mi volas kontaktiĝi, por iniciigi Ligon, por la bonaj rilatoj inter homoj kaj por forigo de la malamo kaj de la malkomprenemo.

La homoj ne devas erari por trovi la rektan vojon, kiu estas la konversacio kaj malferma animo. Kiel vi opinias?

HAJDUKO, CLUJ-NAPOCA

NOVAĴOJ

Je la 14-an de aprilo ni memorigis la 80-an datrevenon de forpaso de L.L.Zamenhof, la kreanto de Esperanto. Je la sama tago en la lokaj, plej gravaj ĵurnaloj en Cluj-Napoca (Mesagerul Transilvan kaj Szabadsag), aperis artikoloj en kiuj oni traktis la vivon, laboron de Zamenhof favore al Esperanto, kaj la traduko en la rumana kaj hungara lingvoj de MANIFESTO DE PRAGO.

La red.

Asocio de Esperanto Cluj okazigas sian ĉiusemajnan kunvenon ĉiu merkrede inter 16-18 h. en la Municipa Kulturdomo, Piata Unirii Nr.24.

La red.

Pasintjare aperis nova kaj utila lernolibro de Esperanto por rumanlingvanoj. Ĝi titoliĝas "Curs rapid de invatare al limbii internationale fara profesor" de Mihai TRIFOI. Ankoraŭ ĝi haveblas ĉe la aŭtoro. Vi povas mendi ĝin je la suba adreso: CLUBUL SCOLAR "ESPERANTO" 4038 BICSAD, Jud. Covasna.

La red.

En la nova juseldonita horarlibro por la trajnoj de Rumanaj Fervojoj (SNCFR) denove aperis klarigoj ankaŭ en Esperanto

La red.

En majo 1997 aperis la 100-a numero de DEBRECENA BULTENO, dumonata informa revuo por esperantistoj, eldonata de Esperanto-Asocio de Debrecen kaj Ĝia Regiono (Hungario). Ni elkore gratulas al tiu ĝojiga jubileo!

La red.

El Timisoara pere de Dorin HEHN kaj prof. Florica POPA, la prezidanto resp. la ĝenerala sekretario de Rumania Esperantista Asocio (REA), ni estis informitaj pri jenaj:

Finfine REA havas propran sidejon en la centro de Timisoara (vid-alvide de vendejo Bega-Traiano), kie estas sufiĉa spaco por kunvenoj E-aranĝoj, renkontiĝoj. Ni kontakteblas ĉiusemajne ĉe "BAZARO" (str. Proclamatia de la Timisoara nr.5, et.2, ĉe la asocio "Tot Banatu-i fruncea".
(La nomo de "BAZAR" havas nenian rilaton kun la titolo de nia revuo. Ndlr.)

Timisoara filio de Fonduso SOROS, subtenis REA-n per pago de abono por INTERNET. Do REA jam povas interkomunikiĝi pere de interreto. Ĝia retroŝta adreso estas:

e.mail.@are.soros.tm.ro

La TTT (tut-tera-teksaĵo) (WEB) paĝo de kultura asocio BANATUL, havas informon en Esperanto. Vi povas legi ĝin ĉe la jena TTT adreso:

<http://inter.banat.ro/banat-media/banat.media.htm>

Ĉi tie vi trovos informojn pri Asocio de Esperanto, respektive historiajn kaj kulturajn datumojn pri Banat kaj Rumanio.

Esperantologia Komisiono, funkcia kadre de Asocio de Sciencistoj - Timisoara-a filio, organizis du gravajn aranĝojn:

-je 24-an de majo, en la sidejo de Akademia Biblioteko, la Timisajn Akademian Tagojn, kadre de kiu funkcias Esperanta Sekcio

-inter 13-15-an de junio okazis la unua internacia renkontiĝo de Danuba Esperantlingva Sciencá kaj Kultura Forumo (DESKF)

Verŝajne en septembro, apud Sibiu okazos la ĉijara RumeJA Kongreso. Pli da informoj vi povos akiri de Mirela FRANTESCU, Aleea Creatiei 9/18. 1900 TIMISOARA.

Monumento al Patro Pio el Pietrelcina estis inaŭgurita la 10-an de novembro 1996 ĉe Paroĥejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo: ĝi estas la unua siaspeca en Rimini kaj en la mondo.

Ĝin starigis la loka "Preĝo-grupo Patro Pio" kunlabore kun la internacia kaj itala katolika Esperanto-movado. Ĝi surhavas dulingvan skribajon, en la itala kaj Esperanto: "Padre Pio, Sacerdote e Vittima; Patro Pio Sacerdoto kaj Viktimo".E.K.

Esperantista scienca aranĝo en Timisoara

Dum la 22a - 24-a de majo oni organizis la jam tradician sciencon aranĝon "La Akademian tagojn de Timisoara". Enkadre de tiu ĉi evento okazis ankaŭ esperantista simpozio, havante la temon:

INTERNACIA LINGVO, PREMISO DE LA ATESTADO DE LA KULTUROJ; TRADUKAĴOJ EN KAJ EL ESPERANTO.

Mem la fakto, ke okaze de altnivela scienca kunveno (sub la aŭspicioj de Rumana Akademio kaj diversaj universitatoj el Timisoara) oni organizis ankaŭ memstaran simpozion en E., montras la akcepton de la esperantista agado kaj la rekonon, ke la lingvo estas taŭga por disvastigi la konojn, la rezultojn de ĝia fakto aŭ scienco.

Por la simpozio oni anoncis deksep diverstemajn prelegojn, situatajn inter gramatikaj temoj ĝis la historio de apotekoj, tra laboraĵoj pri la stilo de la tradukaĵoj kaj pri la filozofiaj aspektoj de la verkaro de L.Blaga. Bedaŭrinde pro diversaj kialoj (precipe pro malsano) sufiĉe multaj mankis, kial oni prezentis nur duonon de la laboraĵoj.

Dum la alparoloj, post la prezentado de la laboraĵoj, oni konstatis, ke la similaj sciencaj renkontiĝoj krom la fakaj gajnoj sukcesas helpi la plilarĝigon de la vorttrezoro de la aŭskultantaro.

Malĝojiga estas la fakto, ke okaze de la samaj organizaĵoj kvazaŭ la samaj personoj ĉeestas, kaj ĉefe el la okcidenta parto de la lando. Kompreneble ni konas la malfacilaĵojn rilate al vojaĝkostoj kaj la prezo de la loĝado, k.a., tamen bone estus se partoprenus samideanoj el la ĉefurbo, Cluj, Braŝovo, ktp. Aliflanke du-tri similaj simpozioj estas multaj por nia esperantistaro. Pretigi akurate, laŭ la nuntempaj postuloj de la sciencoj referaĵojn, eĉ por la spertuloj ne estas facila tasko. Ni ankaŭ pripensu ke Esperanto estas la dua (aŭ la tria) lingvo kaj almenaŭ la dua "fako" de la prelegantoj, tiamaniere la pretigado supozas pluan okupadon kaj tempon. Tial mi proponas, por gardi la favoran

opinion super la esperantlingva scienca agado, ni organizu pli malmultajn, sed bone preparitajn simpoziojn, kun reale valoraj laboraĵoj.

Stefano BUDAHAZY, ORADEA

Ni dankas al **niaj subtenantoj**, kiuj laŭ siaj modestaj eblecoj helpis la eldonon de ĉi-tiu revuo. Ni dankas al:

S-ino Kosa Jolanda, kiu donacis al ni 500 da paperfolioj.

S-ro B.B.F., kiu donacis al ni 1000 da paperfolioj.

Municipa Kulturdomo, ĉar ebligis al ni redakti la nunan numeron per sia komputero.

FUNDAMENTA KRESTOMATIO DE LA LINGVO ESPERANTO de D-ro L.L. ZAMENHOF

EKZERCOJ

§1. (Ekzercaro, §5.)

Patro kaj frato. - Leono estas besto. - Rozo estas floro, kaj kolombo estas birdo. - La rozo apartenas al Teodoro. - La suno brilas. - La patro estas sana. - La patro estas tajloro.

§2. (Ekzercaro, §6.)

Infano ne estas matura homo. - La infano jam ne ploras. - La ĉielo estas blua. - Kie estas la libro kaj la kraĵono? - La libro estas sur la tablo kaj la kraĵono kuŝas sur la fenestro. - Sur la fenestro kuŝas kraĵono kaj plumo. - Jen estas pomo. - Jen estas la pomo, kiun mi trovis. - Sur la tero kuŝas ŝtono.

§3. (Ekzercaro, §7.)

Leono estas forta. - La dentoj de leono estas akraj. - Al leono ne donu la manon. - Mi vidas leonon. - Resti kun leono estas danĝere. - Kiu kuraĝas rajdi sur leono? - Mi parolas pri leono.

§4. (Ekzercaro, §8.)

La patro estas bona. - Jen kuŝas la ĉapelo de la patro. - Diru al la patro, ke mi estas diligenta. - Mi amas la patron. - Venu kune kun la patro. - La filo staras apud la patro. - La mano de Johano estas pura. - Mi konas Johanon. - Ludoviko, donu al mi panon. - Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo. - Antaŭ la domo staras arbo. - La patro estas en la ĉambro.

DELEGITARO EL RUMANIO EN LA JARLIBRO 1996

BRASOV (Poŝtkodo:2200)

D kaj FD (muziko klasika, literaturo; arto) s-ino **Maria-Cristina SARBU**, univ. lektoro, Tel.: (h) 068-136837, (of) 068-115619

VD kaj FD (filatelo, turismo, gastigado): s-ro **Ioan VAJDA**, programisto, B-dul Garii nr.30A, Bl. 225A, Sc.B, Ap.18, Tel.: 068-124812

JD: **Ovidiu GORDEA**, str. Colectivistilor nr.13, Bl.4, Sc.A, Ap.6, Tel.: 068-153783

BUCURESTI

D kaj FD (esperantologio, grafologio, stenografio): prof. **D-ro Aurel BOIA**, emerito, Str.Giulesti 42.Ap.112, 77700 Bucuresti

FD (instruado, organizado, ergonomio): **D-ro Marian CONSTANTINESCU**, doktoro pri ekonomio, emerito, Calea Mosilor 258, Bl.4 bis, Et.5, Ap.17, Sector 2, 70316 Bucuresti, Tel.: 01-659-923

FD (medicino, naturkuracado): **D-ro Caius CHIRITA**, kuracisto, C.P.35-3. Bucuresti, Tel.: 91-7458311.

CLUJ-NAPOCA (Poŝtkodo: 3400)

D: s-ino **Julia SIGMOND**, em. pupaktorino, C.P.200. Tel.:064-181965

FD (industrio; mineja, projektado) **Levente BITAY**, inĝeniero, Str.Gruia 58, Bl.10, Tel: 064-135862

CONSTANTA (Poŝtkodo: 8700)

D kaj FD (fervojoj): s-ino **Adina MOISE**, staciestro, Str. Iasomieci nr.1 Bl LII, Sc.C, Ap.60, TOMIS 3, Tel:041-653395.

COVASNA (Poŝtkodo:4055)

D kaj FD (medicino): **D-ro Gabor LAZAR**, kuracisto, Str.Stefan cel Mare Nr.26/A

MIERCUREA CIUC (Poŝtkodo: 4100)

D kaj FD (turismo):s-ino **Jolanda JOZSI**, Str.Patinoarului, Bl 12, ScA, Ap.3, Tel.: 066-116129.

PRAID (Poŝtkodo:4174)

D: s-ino **Lenke SZASZ**, instruistino, Str.Garii nr.130 bloc, Et.II, Ap.7, Jud. Harghita

SLATINA (Poŝtkodo:0500)

FD (historio): **Doru NEAGU**, licea instruisto, Str.Textilistului nr.4, Bl.G2, Sc.A, Et.4, Ap.19

TIMISOARA (Poŝtkodo: 1900)

FD (esperantologio, lingvistiko: ĝenerala, instruado): **prof.Mioara DOBRE**, Nr.12, cod 2837 RANUSA, Jud.Arad.

FD (instruado:lingvoj, kulturo popola):s-ino **Maria BUTAN**, profesorino,

Aleea Sportivilor nr.34, Ap.3. Tel: (h) 056-164193,(of) 056-194023, 056-200296
 FD (matematiko, informado): s-ino Aurora BUTE, matematikistino,
 Str.Orsova nr.1, Sc.A, Ap.9

ARANĜOJ EN ESPERANTUJO

47-a KONGRESO DE KELI

29.junio - 6 julio 1997 ZALAEGRSZEG, HUNGARIO

Temo: Repaciĝo, donaco de Dio kaj fonto de nova vivo.

Kotizo por Rumanianoj: 100DM por plenkreskuloj
 60 DM malpli ol 21-jaraguloj/studentoj

La kotizo inkluzivas tranoktadon, trifojan manĝon tage, ĉiun programon kaj ekskurson.

Aliĝu al: Elizabeta KASZAB, H-1117 BUDAPEST, Karinthy Frigyes utca 5.

INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO (IJS)

17-23 julio 1997 PECS, HUNGARIO

Temo: Mez-eurolo

Kotizo por Rumanianoj:

-loĝado: -en domo:75DM (7500HUF)

-en tendo:50DM(5000HUF)

-manĝo: 95DM(8500HUF)

La baza kotizo inkluzivas la programon la restadon en kvarlitaj ĉambroj aŭ en propra tendo. Por havi dulitan ĉambro, vi devas krompagi 20 DM/persono.

Rabatoj: 15 DM/1500 HUF -personoj sub 15 jaroj

-10 DM/1000 HUF -personoj sub 25 jaroj

-programkontribuantoj lau persona interkonsento.

Por la tago kun la bala vespero oni devas krompagi 10 DM.

Aliĝu al: David Alko GOLDEN, Damjanich u. 1/c, I, 8, HU-8200 VEJZPREM,
 HUNGARIO, Tel.: +36-88-424339, Retposto: golden@hal2000.hal.vein.hu

53-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO (IJK)

24-31 julio 1997, ASSISI, ITALIO

Temo: La homo. Ĉu super aŭ parto de la naturo?

Kotizo por Rumanianoj: -290.000 ITL -malpli ol 20 j.

-320.000 ITL -inter 20-30 j.

-370.000 ITL -pli ol 30 j.

- 50.000 ITL -memzorgantoj

La kotizo inkluzivas loĝadon en ĉambroj 4 ĝis 8 litaj kun banĉambro, manĝadon kaj programon.

Aliĝu al: Alessandro AMERIO, Via Volante 16, I-10133, TORINO

Tel:+39-11-3854200, Fakso.:+39-11-545731,

Retadreso:a.amerio@agora.stm.it

82-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

19-26 julio 1997, ADELAIDO, AUSTRALIO

Kotizo por Rumanianoj:

Ne individua membro de UEA: 360 NLG

Individua membro de UEA: 285 NLG

Kunulo/junulo/handikapulo ne membro de UEA: 212 NLG

Kunulo/junulo/handikapulo, membro de UEA: 142 NLG

Senpage aliĝas: -infanoj naskiĝintaj post 31-an de decembro 1976

-nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj

La kotizoj ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, asekuron ktp.

Aliĝu al: Libroservo de Australia E-Asocio

p/a s-ro T.ELLIOTT, P.O.BOX 230

2036 MATRAVILLE N.S.W. AUSTRALIO

LA FAMILIA FERIADO

2-9 aŭgusto SAVUDRIJA, KROATIO

Tendumejo por gejunuloj Granda Joczjo

Al ĉiuj familioj, kiuj iel rilatas al Esperantujo.

Kotizo por Rumanianoj:

-senpage por infanoj malpli ol 3 jaroj

-25 DM po tago por infanoj sub 12 jaroj

-30 DM po tago por plenkreskuloj

Aliĝu al: Familio TISLIJAR Stubicka 75, HR-10000 ZAGREB

Tel.:1-328-265-Fakso.: 1-4810-152

JUNULARA ESPERANTO TENDARO

11-18 aŭgusto 1997 SPECHTLOCH, UNTERKINACH apud
 VILLINGEN-SCHWENNINGEN, NIGRA ARBARO, SUD-GERMANIO

Kotizo por Rumanianoj: -60 DM -junuloj malpli ol 21 jaroj grupestroj
 kunvenigantaj almenaŭ du junulojn kaj senlaboruloj
 -100DM -aliaj pli ol 21 jaroj

Por gejunuloj kaj ties grupestroj oni repagos la vojaĝon al kaj reen, escepte la fervoja prezo de la unuajn 200 km tien kaj reen, kondiĉe ke ili preparos iun kontribuon por publika prezentado.

Aliĝu al: Maria SCHIFFER, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen

26-a INTERNACIA RENKONTIĜO NATURAMIKA (IREN)

15-21 aŭgusto 1997 ABALIGET (apud PECS), HUNGARIO

Kotizo por Rumanianoj:

-en du litaj ĉambroj en hotelo kun duŝilo 25.000 HUF (250 DM)

-en unu au du litaj ĉambroj en somerdomo kun lavniĉo: 21.000 HUF (210DM)

-en motelo, du litaj ĉambroj, lavniĉo: 20.000 HUF (200DM)

Aliĝu al: ESPERANTO ASOCIO H-7601 PECS, P.F.98. HUNGARIO

Tel.: +36-72-333123 (s-ino Nelly MATHE)

+36-72-253751 (s-ro Stefano SZUCS)

TEJO SEMINARIO PRI EDUKADO AL PACO

4-11 OKTOBRO 1997, LA CHAUX-de-FONDS, SVISLANDO

Celgrupo estas junaj E-parolantoj sub 30 jaroj, loĝantaj en Europo.

Kotizo por Rumanianoj: 30 NLG, kiu inkluzivas la programon ĉiujn manĝojn kaj loĝigon en ses litaj ĉambroj en junulargastejo. 50% repago de la vojaĝkosto (dua klasa trajnbileto) inkluzive la bezonatajn vizojn.

Ne membroj de TEJO devos surloke aliĝi.

Aliĝu al: Marian BELISLE, Rue de la Serre 28, CH-2300

LaChaux-de-Fonds, Svislando

Tel.: +41 32 914 30 78,

Fakso.: +41 32 913 02 46 (kun indiko "pour M. BELISLE")

KATOLIKA ESPERANTO-TENDARO DE I.K.U.E.

19 julio-2 aŭgusto 1997, SEBRANICE (apud LITOMYSL), CEHIO

Kotizo por Rumanianoj: -30 DM por gejunuloj

-50 DM por salajruloj

La kotizo inkluzivas la tutan dusemajnan restadon (tendarkotizon, loĝadon en la tendo kaj trifojan manĝon).

Estas necese kunpreni propran dormosakon.

Aliĝu al: Miloslav SVACEK, TRSICKA 6, CZ751-27 PENCICE, CEHA RESPUBLIKO.

FESTO 97 (INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO)

1-7 aŭgusto 1997, SAINT RAPHAEL, FRANCIO

Kotizo por Rumanianoj: - 940 FRF -tendumado
-1350 FRF -ĉambro
- 330 FRF -memzorganto

Por pli ol 30 jaroj +100 FRF.

La kotizo inkluzivas tranoktadon, manĝadon (tri po tage) krom memzorgantoj. Ebleco lui tendon kontraŭ 50 FRF.

Aliĝu al: Pascal LECAILLE, B.P.3019 FR-69394 Lyon cedex 03

Tel. kaj fakso+33 4 72 36 07 14

50-a IKUE KONGRESO

31 aŭgusto - 7 septembro 1997, ROMO kaj RIMINI, ITALIO

Kotizo por Rumanianoj:

Partopreno: 50.000 ITL

Restado: - 150.000 ITL en du au tri lita cambro kun necesejo

- 420.000 ITL en unu lita cambro kun necesejo

La prezo inkluzivas tranoktadon, du-tri manĝojn tage kaj la programon.

Aliĝu al: Centra Oficejo de IKUE

via Porta fabbrica, 15

I-00165 ROMA RM, ITALIO

Tel/fakso:+39-(0)6-632839

GDANSKA ESPERANTISTA KONGRESO

24-28 septembro 1997, SOPOT, POLLANDO

Kotizo por Rumanianoj: 250 ZL

Aliĝu al: Vojevodnia Estraro de Pola Esperanto Asocio

str 3 Maja 25, cambro 58, PL-80-802 GDANSK 50, POLLANDO aŭ

PK.222 PL-80-206, GDANSK 6, POLLANDO

Tel/fax: (0-58)32-13-09, Adam SULAK

Tel: (0-58)51-89-16, Zbigniew WIERZBICKI



Se vi deziras korespondi esperante, trovi geamikojn tra la mondo, skribu al:

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

B.P.6, F-55000 Longeville-en-Barrois, Francio

ĜIS LA PROKSIMA NUMERO!

La redakcio ne respondecas por la artikoloj skribitaj de niaj kunlaborantoj, kaj ili ne nepre reflektas la opinion de la redakcio. Ni ne resendadas la manuskriptojn, nur se vi nepre petas tion!



ASOCIO de ESPERANTO CLUJ
C.P 1111
RO-3400 CLUJ-NAPOCA
RUMANIO

al PAPP TIBOR

Trombitás u. 12
H-4031 DEBRECEN
UNGARIA / HUNGARIO

IMPRIIMATE
PRESAJO
NYOMTATVÁNY